

N. N. 32,  
Rozbranĉo forĝermadis

*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
el trunk' de nobelec'.  
Prauloj jam kantadis:  
de Jiŝaj ĝia spec'.  
Floreton portis ĝi,  
en akra vintro estis,  
Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
Jesaja de profet'.  
Maria netuŝita,  
de kiu la floret'.  
Eterne volis Di':  
naskinta infaneton  
Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
alvenas bonodor'  
Ĝi brilas en la koro,  
mallumon pelas for.  
Homido, Dia Vort',  
nin el sufero helpas,  
De pek' Savant' kaj mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo  
<http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.*

N. N. 32,  
Burgonis rozarbedo

*tradukita de Guido Holz*

1. Burgonis roz-arbedo  
el delikata sin'  
laŭ olda kant-heredo,  
Jiŝaj la origin';  
ekĝermis ĉarma flor'  
dum frosta vintro-tempo  
je noktomeza hor'.

2. El virgulin' beata,  
mirinda roz-arbed',  
elvenis flor' benata  
laŭ diro de profet'.  
Laŭ sankta Di-ordon'  
ŝi naskis infaneton  
por nia sav' kaj bon'.

3. Kaj ĉi floreto belas,  
amindas per parfum';  
la nokton ĝi forpelas  
per sia brila lum',  
nin helpas el mizer',  
el pek' kaj morto savas;  
Li, hom' kaj Di' en ver'.

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 - †1989).*

*Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)*

*Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro "Adoru", n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).*